APRILO-MAJO 1948 No. 9

# LA JUNA VIVO

ORGANO POR LA INFANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGALVALORO

## Por la etuloj:

La unua estas mi,
Numero du estas vi.
Ni lernas nun kalkuli:
Du kaj unu estas tri.
Tri kaj unu estas kvar,
Korvo krias: kar-kar-kar.
Kvar kaj unu estas kvin,
Pripensu, mi vidas vin.
Kvin kaj unu estas ses,
Ne diru „ne", diru „jes".
Sekvas nun numero sep,
Birdo pepas: pep-pep-pep.

Sep kaj unu estas ok,
Kokino vokas tok-tok-tok.
Ok kaj unu estas naŭ,
La kato diras: miaŭ.
Naŭ kaj unu estas dek,
Rano vokas, brekekek.
Poste sekvas dekunu,
Kolombo diras: ruku.
Dek kaj dek estas dudek
Kapro diras mek-mek-mek.
Dekfoje dek estas cent,
Dancu ni kun gaja sent'.

## Ludo.


La lernantoj faras grandan rondon. En la mezo sidas knabo aŭ knabino kun unu mano antaŭ la okuloj kaj kun la alia preta por montri al iu. La instruisto elektas unu infanon el la rondo, sed ne diras la nomon. Li diras ekzemple: „La knabo kun la nigra pantalono", „La knabino kun la ruĝa robo", „La knabino kun la blankaj butonoj", „La plej dika knabo", „La knabo sub la tablo", ktp. La aludita knabo aŭ knabino, kiu devas kompreni la vortojn de la instruisto, iru senbrue al la infano en la mezo, kiu provu montri al li (aŭ ŝi) per la fingro. Se ĝi montras ĝuste, ĝi restas en la mezo, kaj la alia reiras al sia loko; en la alia okazo la knabo aŭ knabino el la rondo frapetu ĝin kaj havas nun la vicon kaj la rajton sidi en la mezo.

Rogiero.

## EL LETERO DE ONKLO IGNACIO (Daŭrigo).

Madrido, decembro 1934a.

.........................................................................................



„Ni ĉiuj estas sanaj escepte de nia Karmena; ŝi tusas multe kaj estas ĉiam laca. Ni ne gajnas multe, sed ĉar ankaŭ Pedro kaj Alonzo havas laboroN dum kelkaj tagoj ni ĝuste povas vivi.

Ni vivas en eksterordinara tempo. En oktobro estis ĝenerala striko en Hispanujo. Laŭ la ĵurnaloj la ministoj en Asturio ribelis kaj elektis registaroN de laboristoj. Ili konkeris la urboN Oviedo post tri tagoj da batalo. Oni diras, ke nia registaro sendis Maŭrojn kaj la TercioN [1]) kaj ke ĉi tiuj venkis la AsturianojN post dek tagoj da batalo. Mi aŭdis, ke oni kaptas multajN homojN kaj ke la Maŭroj estas tre kruelaj. Ni ankoraŭ ne scias ĉioN.

Laŭ la ĵurnaloj Katalunio deziras memregadoN. Nia registaro subpremis ribeloN en Barcelono. Ni ankoraŭ ne scias multe pri tio.

Ankaŭ ĉe ni — en Madrido — estis ribelo kaj ankaŭ ĉi tiuN ribeloN la registaro subpremis. Dum kelkaj tagoj ni ne kuraĝis forlasi niaN domoN. Nur Alonzo iris al la Calle de Alcalá, sed li tre baldaŭ *re*venis.

Ĉi tie oni arestis ĉiajN homojN ĉial: ĉar ili apartenas al politika partio, ĉar ili ne apartenas al partio, ĉar ili laboras, ĉar ili ne laboras, ĉar ili estas riĉaj, ĉar ili ne posedas monoN, k.t.p. Oni ne *re*sendis iliN al la hejmo, do eble ni neniam *re*vidos iliN.

Ĉi tie preskaŭ ĉiuj homoj apartenas al politika partio. La soci-al*ismo* [2]), la anark*ismo,* la sindikat*ismo,* la komun*ismo* kaj la faŝ*ismo* kreskas. Mizero, ribeloj ... mi timas, ke venos tre malfacilaj tempoj por ni ĉiuj ..."

[1]) la Tercio — la fremdul-legio, konsistanta ĉefe el hispanoj, kiuj militservis en Maroko.

[2]) ism ne estas vera sufikso.

---

*Atentu!* Ĉi tiu numero estas por aprilo kaj majo. La sekvonta numero aperos komence de junio.

---

## Ĉina ŝerco.

En ĉina kineo pendis granda papero. La posedanto de la kinejo skribis sur ĝi (kompreneble per ĉinaj literoj): „Ne fumu! Pensu pri la granda brulo en Kanton!"

La sekvan tagon iu skribis sub tio: „Ne kraĉu! Pensu pri la granda inundo en Hankaŭ!"

## En danĝero.

Kuracisto akceptas telefonan alvokon. Patro sciigas, ke lia fileto englutis font-plumon.

„Mi tuj venos!" respondas la kuracisto. „Kion vi dume faras?"

Patro: „Mi skribas per mia simpla plumo."

A. Mehtonen, Oulu, Finnlando.

## La konscienco.

La redaktoro de iu gazeto aĉetis kilogramon da sukero. Sed hejme li rimarkis, ke inter la sukero estas kreto-pulvoro. Pro tio li tre koleris, kaj metis en ĵurnalo jenan anoncon: „Hodiaŭ mi aĉetis kilogramon da sukero, sed ĝi enhavis preskaŭ duonan kilogramon da kreto-pulvoro. Se la komercisto, kiu vendis al mi tiun sukeron, ne tuj sendos al mi funton da pura sukero, sen kia ajn al-miksaĵo, mi morgaŭ publikigos lian nomon."

La saman vesperon li ricevis de kvin butikistoj po duona kilogramo da sukero!

## La famulo.

Hans Albers, Willy Fritsch kaj Leo Slezak pridisputis, kiu el ili estas la plej fama.

Willy Fritsch rakontis: Antaŭ kelkaj tagoj mi sidis en la tramo, kaj mi forgesis aĉeti bileton. Tuj knabineto montris al mi, kaj kriis: „Konduktoro, tie sidas Willy Fritsch, li ankoraŭ ne pagis!"

Hans Albers rakontis: „Iam mi volis filmi en la dezerto. Mi venis al negro-vilaĝo, kaj la nigruloj tuj faris ĝojodancon kaj kriis: „Ho! Belege, s-ro Albers, ke vi ankaŭ persone venis al ni!"

Leo Slezak malestime rigardis al ambaŭ: „Ĉu vi volas esti famaj? Tio estas nenio! Rigardu al mi. Mi promenis kun la imperiestro Franz Josef en Marienbad. Pasis maljuna sinjoro, kaj li demandis al sia kunulo: „Kiu estas la maljuna sinjoro, kiu promenas tie kun Leo Slezak?"

Günther Schaedel, München, Germanujo.

## La hundo kun siaj idoj.

Sinjoro havis hundon. Kaj tiu hundo havis kvin idojn. Ili estis tre belaj, kun blankaj kaj nigraj makuloj. Kiam la idoj estis ankoraŭ tre junaj, la sinjoro devis translogiĝi al alia vilaĝo. Por ŝpari la hundo-patrinon, li volis lasi ĝin en la malnova domo, ĝis la nova domo estos en ordo. Al la homoj, kiuj venis en la malnovan domon, li do petis, ke ili bone gardu la hundojn, ĝis kiam li venos por forporti ilin. La hundo tamen ne komprenis tion. Ĝi timis, ke ĝia mastro forlasos ĝin. Ĝi tre ĉagrene ekploris.

Kiam la mastro la sekvan tagon laboris en sia nova domo, kiu kuŝis 5 kilometrojn for de la malnova, li subite aŭdis ploradon.

La sono estis konata al li, kaj li tuj iris por rigardi. Ĉe la antaŭpordo li trovis sian fidelan hundon. Sed la besto estis tiom lacega, ke ĝi nur povis svingeti la voston. Tre kontenta ĝi lasis sin karesi de la mastro. Sed post kelkaj minutoj ĝi ree ekstaris, kaj iris eksteren. Ĝi ĉiam rigardis al la mastro, kvazaŭ ĝi volus diri: „Sekvu min!" Ĝi haltis ĉe arbo en la ĝardeno, kaj tie la sinjoro trovis en nesto de folioj kaj branĉoj la kvin hundidojn. — La fidela besto kvinfoje iris tien kaj reen por alporti, en sia buŝo, siajn infanojn. Ĝi ne povis forlasi siajn idojn, sed ankaŭ ne malhavi la mastron!

## Orient-Afrika negro-knabo faras dolorigajn demandojn.

Vi scias, ke mi estas afrikano. Mia haŭtkoloro estas nigra. Tie ĉi en orienta Afriko vivas du rasoj: blankuloj kaj nigruloj. La blankuloj eltrovis la vorton „Kolorbarilon". Al tio ili ligis diversajn ordonojn, ekzemple: Blankulo nepre ne rajtas interamikiĝi kun nigrulo. Sekvo de tio estas, ke la diversaj rasoj spertas diversan traktadon. „Raso-supereco" ili nomas tion. Nigrulo neniam kaj nenie rajtas sidi flanke de blankulo. Nur en la milito ni tion faris.

Se ankaŭ vi tiel pensas, kiel do povas ekzisti amikeco? Plue mi volas demandi vin: Ĉu en via lando ekzistas „kolor-barilo"? Aŭ ĉu ekzistas speco de „raso-supereco", t.e. ĉu vi juĝas homon laŭ lia raso?

El „Eksterlandaj junuloj diras sian opinion" (interesaj diroj, kiujn la Amikar-Societo permesas publikigi por diskutado).

## Trafa respondo.


Pri la riĉega Rockefeller oni diras, ke li estas avara. Sed nur al almozuloj aŭ al vagabondoj li ne donis monon. Tamen li donis multe da mono al infanhejmoj, blindulhejmoj kaj malsanulejoj.

Foje Rockefeller sidis sur benko en sia parko kaj manĝis kelkajn belajn fruktojn. Vagabondo ŝteliris al li, kaj emocie li rakontis sian sorton. Rockefeller kompatis la mizerulon, kaj donis al li ...... siajn fruktojn. Sed pri tio la vagabondo ne estis kontenta. Li forprenis la gazeton de Rockefeller, envolvis la fruktojn, kaj diris, forirante: „Se vi donacas ion, tiam ĝi devas esti metata en la gazeton".

## INTERNACIA JUNULARKUNVENO

**en Groet, Nederlando (3-10 aŭg. '48).**

La aranĝado bone progresas. Tre verŝajne ni povos loĝi en la granda soldata barako. Tio vere estus ideala, ĉar ĝi povas enhavi 1200 gastojn, havas taŭgajn litojn kaj komfortan kuirejon. Cetere tia loĝado havus historian signifon: en la barako dum kaj post la milito ja loĝis diverslandaj soldatoj kaj militkaptitoj, kaj kontraŭe al tio nun kunestus en ĝi la junaj batalantoj de la „Verda Armeo". Ankaŭ ili estas batalantoj, jes, tamen sen uniformoj aŭ armiloj. La milita konstruaĵo nun aŭdos liberajn diskutojn de la tutmonda junularo, ĝiajn planojn kaj esperojn. Ne ekzistos lingvomalfacilaĵoj; kaj en la malnovaj dunoj, kiuj devis aŭdi tiom da milita bruo, longe sonos la eĥo de la junaj, gajaj voĉoj!



La nederlanda radio raportos pri la kunveno, kaj s-ro Schut ree faros filmon.

Geamikoj, venu grandnombre al Groet! Anoncu vin kiom eble plej baldaŭ, tio multe plifaciligos nian laboron.

*La kostoj* estos (inkluzive de la ekskursoj) por nederlandaj junuloj ĝis 18-j. 20.— guld., por junuloj 18-30-j.: 22,50 guld. Kiu anoncas sin post 15 junio pagas 2,50 guld. pli. Ĉe la anoncado oni pagu samtempe 5.— guld. Por eksterlandaj gastoj la kostoj por restado kaj ekskursoj estos nur 10.— guld. (1 £)

En la venonta numero ni donos detalan programon. Espereble ĉiu partoprenanto alportos sian „brikon" por la vesperaj programoj! Ni jam nun petas vin informi nin pri via kontribuaĵo! Se vi povas deklami, kanti, danci, ludi muzikilon, aŭ ion ajn, faru tion en Groet!

Baldaŭ aperos nova eldono de la „Juna Vivo"-Kantaro. Ĝi estos nia komuna kantlibro dum la I.J.K., do kiu havas malnovan ekzempleron, studu jam la kantojn! Kiu ne posedas ĝin, jam antaŭmendu ekzempleron de la dua eldono!

**Unua listo de partoprenontoj:** 1. Tammo Kanter (17-j.), Leeuwarden (Ned.); 2. Leslie G. Perris (25-j.), 3. Brian R. Perris (17-j.), ambaŭ el Bradford (Brit.); 4. Fülöp Sándor (24-j.) en Gyula (Hung.); 5. Josefo Bangha Varga el Gjör (Hung.); 6-17: 7 knabinoj kaj 5 knaboj (12-14-j.) el Hengelo (Ned.); 18. Ant. Kammerer el München (Germ.); 19. Hedy Tinte el Pinneberg/Holst (Germ.); 20-21. Ges-roj Parker el Burnley (Brit.); 22. Nel Bankersen (19-j.), 23. Koos Jonker (18-j.), 24. Annie Jonker (14-j.), 25. Janny Broekhuis (18-j.), 26. f-ino N. Kool, ĉiuj en West-Graftdijk, (Ned.). Plue venos grupoj el Kommerzijl (Ned.) kaj el Seven Sisters (Kimrujo, Brit.).

Oni anoncu sin ĉe la loka organizanto: S-ro W. Bant, Wagemakersweg A 154a, Groet, Nederlando. Klare aldonu: viajn plenajn nomon kaj adreson, aĝon, sekson. Nederlandanoj samtempe pagu 5.— guld. je la ĝirkonto de S-ro M. v. d. Horst, Joh. Idastr. 32, Rotterdam.

---

## T.J.O.-RUBRIKO.

*(Sekr. M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam-N., Nederland).*

Proponojn por la laborkunsido de TJO en la Int. Junular-Kunveno en Groet de 3-10 aŭg. oni nepre ensendu antaŭ 30-6-'48.

Dum la universala Esperanto-Kongreso de U.E.A. en Malmö ankaŭ okazos kunsido de TJO. Niaj svedaj amikoj aranĝas ĝin, kaj tuj post la kunveno okazos granda kampfajro. En tiu kunveno ankaŭ estos traktataj la proponoj kiujn ni pritraktos en Groet.

La ĉefperantoj bonvolu antaŭ 30-6 ensendi agadraportojn por ke ni tuj post 30-6 povu pretigi la jarraportojn.

Kun ĝojo ni ĉiam akceptas donacojn, kiuj ebligas la daŭrigon de nia

laboro. Eĉ la plej etaj estas bonvenaj. Deŝ pli ĝojaj ni estis, kiam ni ricevis donacon de ne malpli ol 349,18 ned. guld.! Kvankam ni ne rajtas publikigi de kiu ni ricevis la monon, ni volas sciigi, ke ĝi ne venis el Nederlando. Elkore ni dankas ĉiujn, kiuj per malgrandaj aŭ grandaj donacoj plifaciligas nian laboron.

Aperis propaganda broŝuro kun ĉiaj informoj pri TJO kaj Denaska Esperantistaro, pro la dekjara ekzistado de TJO. La prezo por tiu 16-paĝa ilustrita broŝuro estas 0,20 ned. guld. aŭ unu int. respondkupono. Pripensu, kiel uzi ĝin por grandskala propagando. Bedaŭrinde ni ne povas liveri ĝin senpage. Por grandaj kvantoj oni ricevos rabaton.

Ni ree bindigis 500 jarkolektojn de LJV '35/'36. Forte ni instigas nian legantaron aĉeti ĝin, ĉar la enhavo estas tre interesa, kaj — TJO esperas baldaŭ rericevi la elspezojn!

M. v. d. Horst.

---

**La Junularkunveno en la Bavaraj Alpoj.** La programo aspektas tre alloga: De la 15-a ĝis la 17-a de majo la gastoj estos en Munĥeno por partopreni la G.E.A.-Kongreson. De la 17-a ĝis la 22-a oni tendumos en Garmisch-Partenkirchen, ekskursos en la belega cirkaŭaĵo. Ĉiuvespere estos kampfajro.

La ĉeftemo de la diskutoj estos: „Kiel la esperantista Junularo povas akceli la interkomprenigon de la popoloj?"

Jam anoncis sin junuloj el 15 landoj!

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Belgujo:** Kiu pretas kolekti let. en ne-esp. junulargrupoj? Trad. ilin en Esp., kaj sendu ilin al mi. Mi retrad, en la nacian lingvon kaj sendos al belga jun. grupo. Ĝi respondu kaj mi sendu la trad. let. al vi. S-ro Borremans, r. de Bériot 2A, Bruselo.

**Britujo:** Dez. kor. kun ĉiuj landoj: Betty Hardy, (14-j.), 37, Ossian Crescent; Ishbel Collins, (13-j.), 120 Taylor St., Aberhill; Muriel Leslie, (14-j.), 142 Taylor St. Aberhill; Betty Mc.Donald, (14-j.), 39 Ossian Crescent, ĉiuj en Methil, Fife, Skotlando!

Mi dez. kor. kun gejunuloj 14-17-j., pri ĉiu temo. Respondo certa. Brian R. Perris, 168 Bolton Hall Rd, Bolton Woods, Bradford, Yorks.

Mi dez. kor. kun f-inoj 14-25-j. kaj fraŭloj 16-30-j. en ĉ.l. Resp. certa. S-ro L. Graydon Perris, 162, Bolton Hall Rd., Bradford, Yorkshire.

**Bulgarujo:** S-ro Angel Ŝiŝkov, str. „Poborniĉeska" 15, V. Tirnovo, 18-j. lernanto en teĥnika lernejo dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo.

**Ĉeĥoslovakujo:** Komencantinoj (10-15-j.) volas korespondi. Adr. S-ro Josef Rebicek, Olomouc XI, Mánesova 1.

Mi dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn kun la tuta mondo. Josef Forman, 18-j. studento, Praha XIII, Madridská 22.

22 junaj kursanoj dez. kor. Agrikultura lernejo, Tresnovec, p. Lanskroun (rolnická).

30 gekursnaoj, 18-40-j., dez.kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Skribu al: Vlad. Jakubec, 102 Jakub. pr. Jaromer.

**Francujo:** L. Vilette, 214 Rte de la Pyramide, Les Ponts de Cé, serĉas korespondant(in)ojn por siaj grupanoj (14-20-j.).

**Germanujo:** Mi dez. kor. k.ĉ.l. K. Wieczorek, (20), Hannover-Stöcken, Broyhanstrasse 16.

Mi dez. kor. k. nederlandanoj. G. Sornek, Fürsteneck über Passau (Ndb.).

Propagandcele vi sendu bildkartojn, prospektojn kaj esp. gazetojn al la Junular-Rondo Esp.-ista, Düsseldorf, Eiutrachtstr. 6.

**Jugoslavujo:** Mi tre dez. interkontaktiĝi kun la korespondintoj de mia bedaŭrinde mortinta filo Provslav Filipovic. I.a. kun: W. Veldman, M. v. Coehoornstr. 34, Leeuwarden; f-ino J. de Wilde, P. L. Takstr. 10, Zaandam; R. H. Knip, v. d. Marckstr. 12, Utrecht; Rina Tromper, Busken Huetstr. 152, Rotterdam; Joop Geer, Resedastr. 39, Haarlem; W. Herez, Leidsestr. 14, Haarlem, ĉiuj en Nederlando. Ili skribu al Filipovic Miladin, Kragujevac, St. Rad. kolonija br. 18 Z., Serbio.

**Nederlando:** 36 gelernantoj (12-14-j.), samklasanoj en elementa lernejo en Leeuwarden, kaj fervore studantaj Esperanton, dez. kor. per il. poŝtkartoj. Bonv. skribi al: Chris Kruisinga, Bleeklaan 153, Leeuwarden.

S-ro Nan Goudsblom (26-j.), Middenweg B 193, Heerhugowaard (NH), kokidbredisto, dez. kor. kun gekolegoj en ĉiuj landoj.

Bertha Wit, 20-j. f-ino, dez. kor. per il. poŝtk. West-Graftdijk (NH).

Nel Bankersen, 19-j. f-ino, dez. kor. per il. poŝtk. West-Graftdijk (NH).

21-j. knabino serĉas laboron ekster Nederlando kiel helpantino ĉe infanoj aŭ kiel analizistino. Leterojn al s-ino v. Veenendaal, Kapelweg, Limmen.

---

**Filmservo!** Nederlandanoj montru en viaj kunvenoj la filmojn pri la Int. Junularkunvenoj en Groet, Tervuren kaj Ipswich. Petu informojn al s-ro H. J. Schut, Donkerbroek, (Frislando). Britoj turnu sin al f-ino N. Rees, Seven Sisters, S. Wales.

---

Okaze de la 10-jara ekzistado de TJO aperis **propaganda broŝuro.** 16-paĝa, ilustrita libreto, kiu donas detalajn informojn pri la estiĝo kaj disvolviĝo de TJO kaj Denaska Esperantistaro. Plue ĝi enhavas la statutojn kaj liston de perantoj. Ĉiu abonanto nepre posedu ĉi tiun broŝuron. Prezo 0,20 ned. guld. aŭ unu respondkupono. Mendu ĉe TJO-Centro, West-Graftdijk.

---

Propagandu la infan-eldonon „La Juna Vivo". 8-paĝa ilustrita gazeto. Jarabono nur 1.— ned. guld. aŭ egalvaloro. Petu specimenon!

---

Kiuj deziras reprezenti la

**„Esperanto-Film-Grupo"n**

en sia lando, bonvolu anonci sin grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestr. 45, Bergen op Zoom, Ned.

**„LA JUNA VIVO"**

**Internacia Lernolibreto**

(3-a eldono), belaspekta, ilustrita libreto. Moderna lernilo. Prezo 0,50 gld. Vortlistoj, speciale por nederlandanoj: 0,15 guld.

---

**Peto:** Kiu povas malhavi Non 96/97 (januaro-dec. '45/'46) de „La Juna Vivo", bonvolu sendi ĝin al TJO-Centro en W. Graftdijk. Ni jam antaŭe dankas!